

## **Raporto pri la Testudo-Projekto**

### Enkonduko:

Estas longa distanco inter mia lernejo kaj mia loĝdomo. Ĉiutage mi biciklis de Neuallermöhe al Wentorf kaj reen. Mi tre malrapide veturas, ĉar mi ne volas ŝviti. Tial mi havas sufiĉan tempon por pensi pri Esperanto, speciale kiel mi pli bone povus varbi por Esperanto. En mia lernejo, la Gimnazio Wentorf, mi zorgas pri malgranda Esperanto-grupo. Bedaŭrinde nur malmultaj gelernantoj partoprenas en tiu libervolaj instruhoroj. Ankaŭ mia Esperanto-vitrino en la koridoro verŝajne ne bone taŭgas. Kaj miaj gekolegoj apenaŭ montras pretecon aŭskulti min, kiam mi informas ilin pri miaj Esperanto-klopodoj. Nun, en iu malvarma mateno, sole sur mia biciklo mi kaptis novan bonan ideon: Mi faru Esperanto-Kanto-Konkurson en mia lernejo!

### La unua starto:

Tuj, post mia laboro hejmenbiciklante mi planis miajn agadojn por realigi tiun kanto-konkurson. Kaj jam post kelkaj tagoj la koncepto estis preta. Unue mi bezonis premion por la junaj venkontoj. Mi elektis etan platan testudon, kiun mi aĉetis ĉe Woolworth-vendejo. Krome mi farbis ĝin per ora koloro. Ho, kiel ĝi brilas! Tiu premio estus tro valora por stari en mia Esperanto-vitrino en la koridoro. Tial mi petis Günter, kiu estas ja membro en nia loka Esperanto-Grupo-Bergedorf, helpi min. Li faris belegajn fotojn de mia ora besteto. Kaj tiujn fotojn kaj mian alvokon por la Esperanto-Kanto-Konkurso mi fiksas en la vitrino. Krome mi alkrōis kelkajn simplajn esperantlingvajjn kantotekstojn. En du instruhoroj, kiam mi devis anstataŭi malsanajn gekolegojn, mi klarigis la aferon al kelkaj gejunuloj. Ni eĉ provis la konkurson: Tri etajn grupojn libervole stariĝis antaŭ la tuta klaso kaj kantis kaj la aliaj aplaudis. Ja, tio estis vere bona komenco. Sed mi nepre bezonis pluajn grupojn por partopreni. Tial mi devis atendi. En la vitrino la aliaj ja povis legi mian alvokon kaj rigardi la bildojn de la promesata ora testudo. Mi atendis kelkajn semajnojn, sen ricevi bonan rezulton!

Mi atendis eĉ kelkajn monatojn. Neniu montris sian pretecon partopreni en mia konkurso. Granda malsukceso! Kompreneble mi devis rezigni kaj forpreni la varbmaterialon el mia vitrino....

### La dua starto:

Mi forgesis rakonti, ke ankoraŭ dum la preparado de mia sensukcesa kanto-konkurso mi kontaktis lernantinon Katharina el la deka klaso. Mi de longe konas ŝin. Jam en la kvina aŭ sesa klaso ŝi komencis skribi belajn rakontetojn. Kaj en la jaro 2001 ŝi partoprenis mian unuan Esperanto-projekton dum projekt-semajno. Mi petis ke Katharina skribu mallongan rakonton por mia Esperanto-Kanto-Konkurso, por ke mi havu kroman premion por la venkontoj. Kompreneble la titolo de la rakonto devus esti "La Ora Testudo". Katharina tuj montris sian pretecon subteni min kaj jam post nur unu semajno la rakonto estis preta. Estis fabela rakonto en la germana lingvo, en kiu la bestoj faras grandan konferencon kaj la "Ora testudo" inventas internacian lingvon.

Sed nun mi ja decidis nuligi la konkurson. Feliĉe ke mi ne havas aŭtomobilon, mi estas ja devigata ĉiam bicikli al mia lernejo kaj lace hejmen bicikli. Je iu malhela kaj malseka vespero, sidante sur mia bicikla ŝelo, mi denove trovis bonan ideon!

### La tria starto:

Mi decidis tuj traduki la rakonton de Katharina en Esperanton! Feliĉe ke Elena el nia loka Esperanto-Grupo tralegis mian tradukon, ŝi trovis multajn erarojn kaj helpis min plibonigi la tekston. Poste mi ruze pensis pri la plasta besto, kiun mi ja mem estis kolorinta. Ĝi nun ja ne plu taŭgis kiel premio por la kanto-konkurso. Ĝi estos premio por Katharina! Sed pri tiu mi raportos poste. Mi sendis la esperantlingvan tradukon al miaj geamikoj en Esperantujo, al Japanio, al Pollando, al Francio kaj al mia kolego Helmut en proksima urbeto Ahrensburg, ĉar Helmut instruas ja la Anglan. Post nur unu semajno mi ricevis la polan tradukon kaj la aliaj sekvis rapide, eĉ en la korea lingvo. De nun mi celis fari libreton kaj kolekti pli da tradukoj ol vi trovas pri la nova eldono de Harry Potter!

### La daŭranta laboro:

La celo fari libreton postulis ke mi minimume ricevu ĉirkaŭ dek fremdlingvajn versiojn de la testudo-rakonto. Tiam nur indus nomi la aferon "Projekto". Tial mi rakontis pri miaj planoj en nia Hamburga Esperanto-klubo. Dum iu jaŭda vespero Rudi promesis fari la nederlandan tradukon. Kaj dum alia vespero mi faris konatecon kun Maria el Berlino. Ŝi promesis zorgi pri kromaj versioj. Tiamaniere la projekto evoluis. Per retroŝto mi ricevis la hungaran version kaj kolego en mia lernejo, kiu instruas la Latinan ankaŭ subtenis min. Dum la Hamburga Somero vizitis min ĉinaj gesamideanoj, do post kelkaj semajnoj mi ankaŭ ricevis la ĉinan version. Sed mia laboro ne estis nur la kolektado de fremdlingvaj tradukoj. Multajn tekstojn mi disdonis al miaj geklubanoj kaj aliaj por kontrolo kaj plibonigo de la tradukoj. Interalie helpis min Werner, Mariko, Pia kaj Benno. Krome la tekstojn mi devis ja bone presi sur papero. Sed mia komputilo ne bone regas nek la Hungaran nek la Ĉinan k. t. p. Tio estis bona ŝanco demandi mian duan filon Jan! Li estas ja kompetentulo kiu povus helpi min instali la fremdlingvajn literojn por la komputilo. Jes, la tekstoj nun bele montriĝis. Sed estis nur tekstoj. Mia tria filo Kay devis fari bildojn por mia malgranda libro! Li ankaŭ volonte helpis min kaj mia kara edzino vere ŝatis la pentraĵojn. Ŝi eĉ proponis eldoni la libreton kun koloro. Sed mi restis modesta kaj daŭrigas mian kolektadon. Du junaj lernantoj en mia oka klaso ja venis el Ruslando. Mi riskis peti ilin fari la rusan tradukon. Ili bone laboris por mi kaj nun mi havis entute dek du diverslingvajn versiojn de la testudo-rakonto. Mi portis la paĝojn al kopiejo kaj produktis la unuan eldonon, kompreneble nur dek ekzemplerojn. Mi devis ja rekompenci minimume la aŭtorojn. Kaj mi iĝis pli kuraĝa. Mi konvinkis mian HES-klubprezidantinon Vesna-n ke ni produktu pli grandan eldonkvanton. Sekve en Novembro 2003 aperis la bele presita nova verko. Ĉiu, ankaŭ mi, estis kontenta! Nun mi povis ripozi kaj serĉi novajn aventurojn. Sed tiu penso estis eraro.

### La sekvanta kaj la sekvonta laboro:

Intertempe mi donacis ekzempleron de la nova testudo-libreto al Katharina. Ŝi ankaŭ ricevis la "valoran" platan, memkoloritan testudo-skulptaĵon. Jes ŝi fieras. Krome mi skribis mallongan laŭdan artikolon por la loka gazeto. Kaj mi forgesis mencii, ke dum

la tuta tempo mia kolego en Ahrensburg bone subtenas mian projekton. Li ja instalas la tekstojn kaj la bildojn en interreto. Sed tio ne estas la fino. Mi ja nun ofte montris la testudo-libreton al aliaj kolegoj kaj konatuloj kaj tial mi sukcese ricevis kromajn versiojn. Ĝis hodiaŭ mi havas nun ankaŭ la soraban, la hispanan, la rumanan, la platdiĉan, la italan, la litovan, la estonan, la usbekan, la finnan, la latvan, la svedan, la norvegan kaj la portugalan version, entute nun 25 versiojn por la dua eldono!

#### Reagoj, diskutoj, konkludoj:

Ĝenerale ĉiu, kiun mi informas pri mia projekto, montris intereson kaj ofte esprimis pozitivan opinion pri la afero. Ne estis tiel, ke oni entuziasmiĝis, sed ofte mi aŭdis laŭdajn komentariojn. Nur unufoje mi spertis tre gravajn kontraŭdirojn. La platdiĉa versio estis preta kaj la kompetentulo por la platdiĉa lingvo en najbara urbo ricevis la tekston por kontroli ĝin. Li ne ricevis kromajn informojn pri la projekto, nur la peton tralegi la tekston kaj fari malgrandan ekspertizon. Jes li faris honestan ekspertizon. Li preskaŭ disŝiris la tekston. Vehemente li plendis pri la malperfektaĵoj, kiujn li trovis en la rakonto. Mankus la dramaturgaj kvalitoj! Entute li trovis la rakonton tro simpla. Li eĉ dubis, ĉu la uzo de la platdiĉa lingvo estus oportuna. Laŭ lia opinio estus pli bone, se la tuta scenaro okazus en nordgermana ĉirkaŭaĵo. Fakte, la rakonto ne plaĉis al li. Mi ne insistis pri kroma diskuto. Mi ja nur celis havi bonkvalitan tradukon. Tial mi informis la platdiĉan eksperton pri la projekto mem kaj li tuj konsentis tralegi kaj iomete plibonigi la tradukon.

Kompreneble la rakonteto ne estas granda literatura verko! La juna aŭtorino ne estas profesiulino! Tamen laŭ mia impresado ŝia rakonteto bone taŭgas por la Esperanto-varbado. La libreto estas bona materialo por montri, ke en Esperantujo multaj homoj bone kunlaboras. Ankaŭ la kunlaboro inter la esperantistoj kaj la ne-esperantistoj en tiu projekto estis bonega. Ni esperantistoj ja nepre bezonas aliajn fremdlingvaj tradukojn por montri kiom da diversaj interesaj lingvoj ekzistas. Kaj estas tute normala afero ke ankaŭ Esperanto estas unu inter ili.

"La Ora Testudo" estas rakonto, kiu ankaŭ sen Esperanto valoras por ni en Esperantujo, ĉar ĝi ja traktas la lingvoproblemojn en nia mondo sen uzi la nomon "Esperanto". Mi vere fieras, ke ekzemple mia kolego, kiu skribis la latinan tradukon, uzis la latinan tekston en siaj instrueroj en deka klaso. La gelemantoj tie lernis la latinan lingvon, ne Esperanton, tamen ili devis pensi pri la lingvoproblemoj kaj la ideo de internacia lingvo. Kompreneble, mia kolego insistis, ke en iama tempo la internacia lingvo estis la latina. Sed tio ne gravas.

Ankoraŭ alia travivaĵo: Mi babilis kun gepatroj de unu el miaj lernantinoj. Ili devenas el vilaĝo en Ŝlesvig-Holstinio kaj vivas kaj laboras en bieno. Estis tre agrabla babilado, la lernantino ne kaŭzis problemojn kaj tial ni povis eĉ ŝerci iomete. Tute hazarde mi demandis la patron, ĉu li regas la platdiĉan. Li jesis kaj mi tuj rimarkis, ke mi, kvankam devenante el Hamburgo nur malbone parolas tiun lingvon. Sed mia kunparolanto ĝojis ke mi klopodis. En tiu situacio mi rakontis pri mia projekto. Mi nur parenteze atentigis lin pri la rolo de Esperanto en tiu projekto. Sed mi emfazis ke mi nun ankaŭ havas la platdiĉan version de la testudo-rakonto. Sekve mi proponis fotokopii por li nur la platdiĉan tekston. Kelkajn tagojn poste la juna lernantino alportis al mi dankon de la patro, kiu hejme laŭtleĝis la rakonton al la aŭskultantaj infanoj.

#### **Koran dankon al ĉiuj subtenantoj de la "Testudo-Projekto" !**

Partoprenis la aŭtorino, unu pentristo, 24 tradukistoj, certe pli ol 15 recenzistoj, unu interret-kompetentulo kaj 3 aliaj helpantoj, do sume minimume 45 aktivaj personoj!

Klaus Friese, 21035 Hamburg

23-a novembro 2004